Joseph Düpjohann,

# La birdokanto

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Mi aŭdis birdokanton,
belege sonis ĝi;
mi volis ĝin kompreni,
ravita estis mi.

Ĝi kantis frumatene -
trankvilo ĉie ĉi;
forgesis mi la zorgojn,
rekonsoliĝis mi.

Momenton mi ekpensis
ne plu pri l' taglabor';
mi volis pluaŭskulti,
sed devis iri for.

Vesper' fariĝis baldaŭ,
rapidis hejmen mi,
por aŭdi mian birdon;
sed ne revenis ĝi.

*Traduko de la Basgermana poemo "De Vuegelleed" de* JOSEPH DÜPJOHANN *(Ostenfelder Str. 28, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1930-10-18) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 2003-03-19.*

*MR-401-1 / Arg-249-505 (2004-06-30 15:20:30)*

*Kun afabla permeso de l' aŭtoro, sinjoro Joseph Düpjohan (Ostenfelder Str. 28, D-59302 Oelde, Germanio), prenita el la libro "Liäbensbeller" ("Vivobildoj"), kiu aperis en 1998 en la eldonejo E. Holterdorf, Ruggestr. 27 - 29, D-59302 Oelde, F. R. Germanio.*